

Invitilo al komuna programo de Esperantista klubo Brno kaj Esperantista klubo en Glivice

Karaj gesamideanoj,

Ni kore invitas vin al komuna programo de du esperantistaj kluboj el du landoj – ĉeĥa klubo en Brno kaj pola klubo en Glivice.

Temo

Milita stato en Pollando per miaj okuloj

Rakontado, diskuto

En la jaro 1980 post protestoj de laboristoj en ŝipkostrufabriko en Gdańsk gvidantaj de Lech Wałęsa [elparolu leĥ valensa] estis en Pollando fondita sindikata organizo Solidarność (esperante Solidareco) sendependa de la komunisma reĝimo. Jam en decembro 1980 la ĉeĥoslovakia kaj demokratgermana armeoj estis pretaj venki la liberigon de Pollando. Tio ne okazis. Tamen unu jaron poste, la 13-an de decembro 1981 pola ĉefministro Wojciech Jaruzelski deklaris en Pollando militan staton. Komenciĝis cenzuro, homoj ne povis libere vojaĝi. Kontraŭkomunistoj estis arestitaj, homoj, kiu protestis, estis eĉ murditaj.

Kiel la tempo influis vivon de ordinaraj homoj? Venu, kaj rakontu. Ne gravas, se vi tiam estis heroo, kiu protestis kontraŭ la ago de la reĝimo, aŭ vi simple klopodis al kutimiĝi kaj travivi. Ĉiu rakonto estas interesa.

La renkontiĝo estos registrata. Diru nur tion, kion oni povas publikigi. Per miaj okuloj estas ciklo de rakontado, kiel ordinaraj homoj travivis gravajn eventojn en ĉeĥa historio. En nia jutubo vi povas spekti jam kvin registraĵojn.

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 12-an de oktobro 2022 je 18.00 (UTC+2).

Kie: La renkontiĝo okazos rete per Zoom

Jen la ligilo:

<https://pol-sl-pl.zoom.us/j/94294806502?pwd=aE16aEdGck9NdZljK1VZVUJWbWtoUT09>

Enirkodo: 942 9480 6502

Pasvorto: 223880

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Ni vidos.

Renkontiĝo estos registrata.



Ni rekomendas

- la 11-an – 13-an de novembro **120-a datreveno de la praga e-klubo**, Praha



Cetera programo en oktobro

La 19-an **Kion ni legas** – diskuto, Občanský klub, Hybešova 65a, Brno

La 25-an **Universala Kongreso 2022 en Montrealo** – Petr Chrdle, rete per Skajpo (atentu, escepte la prelego okazos jam marde)

Programo en novembro

La 2-an **Ankoraŭ ne agordita**, Občanský klub, Hybešova 65a, Brno

La 9-an **Ankoraŭ ne agordita**, rete per Skajpo aŭ Zoom

La 16-an **Pri energia reto** – Martin Sedlák, Občanský klub, Hybešova 65a, Brno

La 23-an **Ankoraŭ ne agordita**, rete per Skajpo aŭ Zoom

La 30-an **Tuberkulozo** – Odřich Arnošt Fischer, Občanský klub, Hybešova 65a, Brno

Mi petas vin, ke vi jam primensu vian proponon por aŭtuna programo. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrno/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA>).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servo považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu) a on-line schůzky.

Milan Kolka
prezidanto